

Geografia nomenklatur, respondo al Tibor Sekelj, 3-a parto
kaj Leterkesto: Jiri Patera en Most, Ĉeĥoslovakio
Claude Gacond, 314-a radioprelego, 1969.10.15 & 18

Cl.- Parolas gesinjoroj Claude kaj Andrée Gacond.

Kiel ni anoncis la pasintan semajnon, ni finas la diskutadon de la kritikoj al niaj radioprelegoj pri la geografia nomenklatur ricevitaj de sinjoro Tibor Sekelj.

A.- Tibor Sekelj skribas : « *Neniu infano iros esplori la etimologion de la nomo Usono, kiel lernante ekzemple la anglan li ne ekzamenos la etimologion de la vorto **Germany** aŭ **Sweden**.* »

Cl.- Nia respondo : Dum ok jaroj mi instruis esperanton en la lernejo, kaj ĉiujare la infanoj informiĝis, kial oni diras **Usono** por tiu lando. La samon mi rimarkis en la vesperaj kursoj.

A.- Tibor Sekelj atentigas nin, ke li nenion proponis, sed la Internacia Komisiono por Ordigo de Geografiaj Nomoj. Kaj kion ĝi proponas neniel estas « transskribo », sed esperantigo. En tio ĝuste estas la tuta diferenco kaj miskompreno.

Cl.- Jes, sinjoro Tibor Sekelj pravas, la esperantigo estas tiu de la Internacia Komisiono por la Ordigo de Geografiaj Nomoj, kies motoro li estas. Ni pensas, ke la miskompreno aŭ diferenco inter niaj vidpunktoj naskiĝas de nia koncepto de la esperantigo kaj de la koncepto de la esperantigo de la Komisiono. Kio bedaŭrinde mankas, tio estas klarigoj pri la principoj de tiu esperantigo.

A.- Sinjoro Tibor Sekelj poste skribas : « *Vi devas havi tute specialajn infanojn, kaj same por iliaj gepatroj, se ili, anstataŭ Danubo preferus lerni Donau-Dunaj-Dunav-Duna-Dunarea ! Ili verŝajne anstataŭ mano preferus lerni « hand-kéz-mano-ruka-te, kaj tiel plu.* »

Cl.- Nia respondo : Denove manko de distingo inter la komunaj nomoj kaj la propraj nomoj. Tiu manko estas gravega. Plie mi neniam parolis pri tiu lernado. Mi klarigis, kiel devus esti esperanta mondmapo, laŭ nia vidpunkto. Mi relegas tiun tekston : « Ĝin malfermante oni tuj devus rimarki du aferojn : ke la nomenklatur estas donita en la naciaj lingvoj kaj en esperanto. Tio signifas, ke unuflanke tiu mondmapo majstre respegulus la mondan babelismon, ĉar la geografiaj nomoj estus skribitaj en plej diversaj alfabetoj. Se per nia rigardo ni irus de okcidenta Eŭropo al orienta Azio, ni povus vidi sur la mapo sin desegni la teritoriojn, kiuj uzas la latinan alfabeton, kaj poste la cirilan alfabeton, kaj poste la plej diversajn skribojn, por fini per la ideogramoj en Ĉinio kaj Japanio. Jen la monda geografia situacio, ŝajnus diri tiu mapo. Kaj vi povas imagi la intereson de tia dokumento, ĝuste pro la aŭtenteco de tiuj nomoj, kiuj kvazaŭ atestus pri la ekzistaro de la plej diversaj lingvoj. Sed per alia koloro, sub tiuj nomoj troviĝus ilia esperantigo. Sed esperantigo, kiu ne devas esti farita laŭ la metodo de la Internacia Komisiono por Ordigo de Geografiaj Nomoj. Tiu esperantigo devus respekti la personecon de la geografiaj nomoj. Tiu esperantigo devus konsideri la geografiajn nomojn, kiel proprajn nomojn. Tiu esperantigo devus klopodi transskribi la geografiajn nomojn per la literoj de la esperanta alfabeto sen konsideri la esperantan gramatikon. Tio signifas, ke ĝi devus rezigni alglui al ĉiu geografia nomo la substantivan **o**. Se vi volas, ni havus geografian radikaron.

A.- Poste ni raportis pri la laboro de la *Japana Enciklopedieto* kaj ni alvenis al Eŭropo.

Cl.- Ni ĵetu rigardon al Eŭropo. Ne necese ĉiuj nomoj devas esti fonetike transskribitaj. Se ni ekzamenus la riverojn Rejno kaj Danubo ni ekzemple rimarkus, ke sur la mondmapo ili posedas plurajn nomojn. La rivero Rejno posedus la nomojn Rhein, Rhin kaj Rijn, laŭ la lingvo-teritorioj, kiujn ĝi akvas. La rivero Danubo nomiĝus Donau, Dunaj, Dunav, Duna kaj Dunarea. Tiel, konsultante la mondmapon, ni havus kontakton kun la etimologia realeco. Kaj

Geografia nomenklaturu, respondo al Tibor Sekelj, 3-a parto
kaj Leterkesto: Jiri Patera en Most, Ĉeĥoslovakio
Claude Gacond, 314-a radioprelego, 1969.10.15 & 18

tuj vi komprenas, ke tiu mapo estus utila ilo uzebla por la instruado pri geografio, dum la mapo, kiu nun estas al ni proponita, estas ilo neuzebla en la lernejoj.

A.- Kaj ni klarigas kial. Nenie ni parolis pri lernantoj, kiuj devus lerni la naciajn nomojn.

Cl.- Ni dediĉis multe da tempo por la redaktado de niaj radio-prelegoj pri la geografia nomenklaturu. Ni volis prezenti panoraman bildon pri la hodiaŭa situacio. Ni prezentis la diversajn vidpunktojn, ni donis nian personan vidpunkton. Ni estas pretaj diskonigi vidpunktojn, kiujn ni ne ankoraŭ diskonigis. Sed kion ni neniam akceptos, tio estas subjektiva reago kontraŭ nia laboro. Komence de ĉiuj niaj dekdu prelegoj ni atentigis la geaŭdantojn pri la graveco de la debato malfermita de Tibor Sekelj per la eldono de *Mondmapo* kaj de propono de geografia nomenklaturu. Sed tio ne signifas, ke ni pravigas tiun nomenklaturon.

A.- Tiu *Mondmapo* malfermis debaton. Nun ĉiuj opinioj devas povi esprimiĝi. Sed ili devas esprimiĝi sen simpligi la opiniojn de la ceteruloj.

Cl.- Kio plej gravas, estas difini, kio estas esperantigo, kio estas komuna nomo, propra nomo, kiu povas partopreni la debaton, kiel devas okazi la debato, kiam devus okazi kongreso pri tiu temo? Ni laboros al la precizigo de tiuj pozicioj kaj volonte organizos la kongreson, kiu malfermos parolan debaton pri la geografia nomenklaturu en esperanto.

A.- Fine de tiu elsendo ni citos sinjoron Jiri Patera en Most, Ĉeĥoslovakio, kiu skribas :

Cl.- « Vere mi ne konsideras ĝusta la klopodon perforte esperantigi ĉiujn geografiajn nomojn. Tio faras grandan malutilon. En fakaj kaj sciencaj verkoj tio estus nepardonebla peko. Sed kontraŭe en beletristiko la esperantigo de propraj nomoj iam estas tre dezirinda. Dum la neŝanĝitaj nomoj aspektas iom tro fremdaj, tro nekonataj aŭ iam alloge ekzotikaj, iliaj esperantigitaj formoj povas impresi amike, konate, najbarece. Same estas ankaŭ en la naciaj lingvoj. Ekzemple la konata romano de G. Chevallier **Clochemerle** estas tiamaniere tradukita en la ĉeĥan lingvon... La tradukisto komplete ĉeĥigis la nomojn de la vilaĝoj kaj de la homoj tiel, ke ili estas intime amikaj al la ĉeĥa leganto. Tia traduko neniel difektas la originalon, sed plifortigas ĝian efikon. Do ankaŭ en Esperanto la esperantigo de personaj kaj geografiaj nomoj havas iam sian pravigon en la bela literaturo. »

A.- Ni pretas diskonigi plej diversajn vidpunktojn pri tiu temo geografia nomenklaturu, kondiĉe ke ili ne simpligu la poziciojn de la ceteruloj.

Cl.- Vi aŭdis prelegon el Svislando. Parolis gesinjoroj Claude kaj Andrée Gacond. Ĝis reaŭdo !

-oOo-